

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La *Plena Ilustrita Vortaro* ĵus eldonita de SAT entenas proprajn nomojn. Jen granda progreso rilate al la *Plena Vortaro* de 1934, kiu pravas, ke esperanto maturiĝis. Ni hodiaŭ legos al vi erojn el ĉapitro de la **Antaŭparolo** de la *Plena Ilustrita Vortaro*, kiun Gaston Waringhien dediĉis al la propraj nomoj :

A.- « Jam de longe, skribis Waringhien, multaj uzantoj, kaj inter ili Lanti, esprimis la bedaŭron, ke la *Plena Vortaro* ne entenas proprajn nomojn.

Cl.- Grosjean-Maupin opiniis, ke tio estas tro malfacila demando, kiun nur « *la estonteco solvos, se solvebla* ».

A.- Tamen la kreskanta literaturo, la oftigo de aviadilaj vojaĝoj kaj la densigo de la internaciaj rilatoj faras tre dezirinda ian solvon, eĉ provizoran kaj neperfektan.

Cl.- Unuan paŝon en tiu direkto mi faris en mia *Grand Dictionnaire*, apogante min sur la sistemo de E. Würster en lia *Enciklopedia vortaro* kaj sur la du rimarkindaj apendicoj al la *Nova Vortaro Japano-Esperanta*, en kiujn J. Okamoto kolektis el multaj diversaj fontoj la jam proponitajn formojn de personaj kaj geografiaj nomoj.

A.- Nun mi prezentas al la juĝo de la publiko iom pli ampleksan kaj pli koheran liston. » (Fino de la citaĵo.)

Cl.- Gaston Waringhien poste donas interesajn klarigojn pri la principoj, kiuj gvidis lin. Estas utile koni tiujn principojn.

A.- El la person-nomoj li konsideris precipe du kategoriojn : la historiajn kaj la individuajn (kiujn estas kutime kvalifiki « antaŭnomoj », kvankam ĉe pluraj popoloj, ekzemple la japanoj, ili estas ĝuste « postnomoj »).

Cl.- La person-nomoj efektive harmoniiĝas pli facile kun la cetera materialo de la lingvo kaj, eĉ kiam oni ne asimilas la familian nomon, oni volonte uzas nacian formon por la individua.

A.- **Mary** Stuart fariĝas franclingve **Marie** Stuart, **Heinrich** Heine – **Henri** Heine, kaj tiel plu.

Cl.- Gaston Waringhien konsilas fari same en esperanto.

A.- Al la historiaj person-nomoj la naciaj lingvoj ordinare konservas ilian originan ortografion, kaj plej ofte same faras la esperanta uzado, krom pri la antikvaj, kiuj ĝenerale estas asimilitaj.

Cl.- Al la antikvaj person-nomoj Gaston Waringhien dediĉis la plej grandan parton de la disponebla loko, sekvante ĝenerale la transkribon, kiun proponis E. Würster.

A.- Tamen ĉe la virin-nomoj li sistemigis la finaĵon **-a**, kies uzon proponis K. Kalocsay ekde 1931 kaj kiu de tiam ne ĉesis disvastiĝi.

Cl.- Laŭ la ekzemplo de Zamenhof, Gaston Waringhien konservis la duoblan konsonanton ĉe la unusilabaj radikoj, kio tre faciligas ilian rekonon. Ekzemple **Anna**, **Emma** estas skribitaj kun duobla **n** kaj duobla **m**.

A.- Por la hindaj nomoj Gaston Waringhien helpis sin precipe per la tre bona *Leksikologia Komentario*, kiun J. Régulo Pérez aldonis fine de *Nepalo malfermas la pordon*.

Cl.- Tamen unu punkton li ne povis akcepti, tio estas la konservado de la litero **h** post konsonanto, kio ŝajnas al li kontraŭa al la kutimoj de esperanto.

A.- Kial esperanto devus malrespekti sian tradician ortografion favore al la hindoj, dum ĝi rifuzas tion fari por la hebreoj, helenoj, kaj tiel plu ?

Cl.- Pri la modernaj geografiaj nomoj Gaston Waringhien tiris tre grandan profiton el la *Mondmapo*, kiun kompilis la **Internacia Komisiono por ordigo de la geografiaj nomoj**. Tamen en kelkaj okazoj li proponis aliajn solvojn.

A.- Por la ĉefurbo de Finnlando li proponas la nomon **Helsinki** dum la *Mondmapo* proponas **Helsinki**.

Cl.- Respektante la antaŭajn decidojn de la Lingva Komitato, Gaston Waringhien, por la landnomoj, ĉie uzas la sufikson **-ujo**, krom ĉe la ŝtatoj, kiuj ne prezentas unu solan naciecon. Sed en la nomenklaturado li regule mencias ankaŭ la sufikson **-io**, pro ĝia vasta uzateco kaj ofta oportuneco, precipe en la derivitaj formoj. **Italia** estas pli plaĉa ol **italuja**.

A.- Pri kelkaj malfacile solveblaj okazoj, Gaston Waringhien opinias, ke eblas tiri per retroderivado el la internacia nomo de la loĝantoj pli taŭgan formon por ilia lando : el la angla kaj itala **Congolese**, franca **Congolais**, hispana **Congoleño**, oni ricevas tiel **Kongolo**, formon analogan al **Angolo**.

Cl.- Kiam propra nomo de rivero, monto kaj simile estas kunmetita al komunuzaj substantivo kaj adjektivo, Gaston Waringhien ordinare lokis la adjektivon post la substantivo por, per tia malobservo de la kutima vortordo, faciligi la distingon. Li skribas ekzemple : **Arbaro Nigra**, **Maro Morta**, **Montoj Rokaj**, kio malebligas la konfuzon kun iu nigra arbaro, aŭ rokaj montoj.

A.- Evidentiĝas tendenco konservi en la esperantigo formon kiel eble plej proksiman al la nacia ortografio : oni renkontas preskaŭ nur **Betoveno** aŭ **Dresdeno**, anstataŭ la fonetike pli ĝustaj **Betovo** aŭ **Dresdo**.

Cl.- Por la ĉinaj propraj nomoj Gaston Waringhien uzas la liston, kiun bonvolis aranĝi por li Ĉina Esperanto-Ligo. La leganto eble miros pri la nova formo de konataj nomoj, kies antaŭan skribon Waringhien cetere mencias : tiu transskribado estas ja konforma al la *Hanlingva Fonetika Alfabeto* aprobita de la Ŝtata Konsilio kaj de la Nacia Popola Kongreso.

A.- La elekto, kiun Gaston Waringhien faris inter la multegaj urbonomoj, povos ŝajni iafoje kaprica : la ĉefa motivo estas, ke li konsideris pli la historian kaj kulturan aspekton, ol la nuran ekonomikan. Cetere pluraj estas donitaj precipe kiel ekzemploj de ebla transkribado el malfacile asimilebla nacilingva formo.

Cl.- Principe ĉiuj geografiaĵoj estas akompanataj de siaj mapaj koordinatoj : tiun sistemon, la solan logikan kaj internacian, ni ŝuldas al A. Caubel, kiu bonvolis ŝarĝi sin per tiu kroma tasko, aldonante tiel plian valoron al la *Plena Ilustrita Vortaro*.

A.- Al la esperantistaro nun decidi ĉu la propraj nomoj proponitaj de Gaston Waringhien taŭgas aŭ ne taŭgas.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !